# Informilo

Monata revuo de F L A N D R A E S P E R A N T O - L I G O
Maandblad van V L A A M S E E S P E R A N T O - B O N D

Jarkolekto / Jaargang N° 1 jul/aug 1981

Verantwoordelijke / Respondecas Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

---

0 1 JULI 1981

Kara Leganto,

Por komplezi al tiuj personoj, kiuj havis la kuraĝon reagi al la prezentado de la unua numero de nia revueto INFORMILO, vi trovos la ĝeneralan ordigon iomete ŝanĝita.

La protokoloj pri la estrarkunsidoj ne plu estas integra parto de la bulteno, sed elprenebla kaj, por pli da facileco, ĝiaj paĝoj estas numeritaj per romanaj ciferoj.

Tiel eblos forpreni la protokolojn, por klasigi ilin aparte se tiel estas via deziro, sen ke per tio la revueto estu domaĝita en sia tuto.

Ni esperas, ke tiu iniciato forportos vian aprobon kaj, atendante viajn pliajn "aldonaĵojn", deziras al vi agrablan legadon.

JB

## I N F O R M I L O

Kadrogazeto. Aperas ĉiu-monate, krom en julio kaj aŭgusto.

Abono : BF 100,- jare
pagenda en la konton
001-0073007-42 de
Jan Bovendeerd, Mortsel
menciante "INFORMILO"

Kadromembroj de FEL ricevas ĝin senpage.

"INFORMILO" estas kontaktilo/diskutilo inter la estraro kaj la membraro de FEL. Ĉiu povas partopreni en ĝi per personaj kontribuaĵoj. Tiuj ĉi kompreneble restu sub la respondeco de la kontribuantoj.

Tekstoj atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la monato.

## F E L - Ŝ P A R K O N T O

### FIKSDATAJ MONDEPONOJ

Minimumaj sumoj : BF 5.000,-

Minimuma periodo : 2 jaroj

- ĉu per pago en unu el la kontoj :
  402-7069801-50
  000-0265338-43
  menciante : DEPONO
- ĉu rekte al la Direktoro de ESPERANTO-CENTRO ANTVERPENO

## LIBRO-SERVO SONORILO

Doornstraat 22
2610 WILRIJK
Direktoro : Monique VEREECKEN
Telefono : 031/27 24 05
Kontoj : 000-0152140-44
320-0342460-23

## FLANDRA ESPERANTO-LIGO

Arsenaalstraat 5
2000 ANTWERPEN
Telefono : 031/16 05 05
Direktoro : Paul PEERAERTS

### FEL-estraro

Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT
031/66 62 66
prezidanto, estrarano pri informado, planado, agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK
031/27 24 05
vic-prezidanto, estrarano pri financplanado

Jules VERSTRAETEN, St Bernardsestwg 1078
2710 HOBOKEN
031/27 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORSTEL
031/49 50 06
ĝenerala sekretario, estarano pri administrado kaj edukado

Fernand ROOSE, St Klaradreef 59
8000 BRUGGE
050/33 19 81
estrarano pri kulturo, respondeculo por Okcident Flandrujo.

René BUDTS, Fortlaan 64
9000 GENT
091/21 40 15
respondeculo por Orient Flandrujo

Marie Thérèse HENQUINEZ, Lipsestraat 166
2991 TILDONK
016/23 61 90
respondeculo por Brabanto.

Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113
3538 HELCHTEREN
011/53 64 10
respondeculo por Limburgo

Kristin TYTGAT, St Hathebrandstraat 8
2510 MORTSEL
031/49 50 24
Kontaktoj kun la junularo (FLEJA)



Karaj Gemembroj,

Kiel nia sekretario skribis en la enkonduko al la unua numero de nia novstila " INFORMILO ", ni eble nun faras la unuan konkretan paŝon al vere flandra Esperanto-revuo.

Se ni deziras antaŭenigi la Esperanto-movadon en Flandrio, ni bezonas ne nur informilon, sed ankaŭ ligilon inter niaj membroj.

La estraro de FEL regule sendas sufiĉe detalajn protokolojn pri niaj monataj kunvenoj al ĉiuj grupoj kaj al ĉiuj reprezentantoj. Sed tio ne sufiĉas ! Por ke ĉiuj membroj povu vere interesiĝi pri nia laboro kaj nia agado kaj senti sin integritaj en la movado, ili unualoke devas esti INDIVIDUE bone informitaj. Poste la eblo devas ekzisti por ĉiuj skribemuloj komuniki siajn spertojn, ideojn, kritikojn, sugestojn al la aliaj membroj. La eblo devas ekzisti por ĉiuj skribi artikolojn aŭ beletraĵojn, studojn aŭ amuzaĵojn.

Pere de tiu informilo (revuo), ni povus organizi skriban perfektigan kurson. Revuo ja ebligas multajn diversajn kontaktojn.

Ĉu jam nun ne ekzistas tra da revuoj ? Ĉu nova revuo ne signifas dispecetigo de la disponaj homaj fortoj ? Ĉu finaĉe ni povas realigi tian projekton ?

Al tiuj kritikaj demandoj, mi respondas nur, ke ni ne deziras iri rapidege, ke iom post iom el la nuna embrio kreskos tutnature io nova, tio pri kio ni nun revas ...

Valora nacia revuo sendube trovas sian lokon flanke de internaciaj kaj fakaj revuoj. Ilia rolo ne estas la sama, sed kompletiga unu por la alia.

Ĉu nacia revuo anstataŭas la lokajn, grupajn informilojn ? Ne necese. El tiuj lokaj revuetoj ni povas ĉerpi artikolojn kaj ideojn por nia nacia revuo. La loka spegulas la kluban aŭ regionan agadon; la nacia revuo kontraŭe ampleksas la nacian Esperanto-vivon. Kaj en la nuna fazo de nia movado, la skriba lingvo ludas, laŭ mi, eĉ pli grandan rolon ol la parola !

Mi tute ne subtaksas la amason da laboro kiu atendas nin, sed dank'al bone organizita kunlaboro, ni povas venki ĉiujn obstaklojn.

Ekde nun, sendu al ni viajn rimarkojn kaj sugestojn kaj, precipe, vian konsenton aktive kunlabori !

Edward Symoens
prezidanto de FEL.

D I S K U T A N G U L O

Sekve al niaj unuaj konsideroj en numero 1 de INFORMILO, venis tiom da respondleteroj en la poŝtoficejon, ke la leterportisto ne sukcesis ilin liveri !

Tio tiom enkuraĝigis nin, ke ni daŭrigas la diskuton per jenaj pliaj konsideroj.

KIEL FINANCI NIAJN PROJEKTOJN ?

Napoleono siatempe bezonis por sukcesi tri aferojn : monon, monon kaj monon.

Ni, en FEL, bezonas nur unu el la tri. Vi mem elektu kiun.

---------

En niaj rangoj estas verkisto(j). Unu el ili (?) estas Antverpenano, konata de ĉiu aŭ proksimume, nome Amiko Rik de Roover.

Rik jam verkis plurajn aferojn, ekzemple rakontaro el kiu li jam regalis la verdstelanojn per voĉlegado dum klubkunvenoj.

Li ankaŭ verkis infan-romaneton " LA AVENTUROJ DE ŜPAR- KAJ ALIA PORKO " dum li estas laboranta super "fabelo por plenkreskuloj", kies titolo tamen ankoraŭ ne estas konata al ni.

La estraro de FEL, post priekzameno, decidis eldoni la "AVENTUROJ..." se eble (nepre ! ) antaŭ la kongreso 1982 en Antverpeno.

Se ni estas bone informitaj, Rik ankaŭ partoprenis en la ĉi-jara beletra konkurso de la universala kongreso. Ke li gajnu premion, estas nia ĉies deziro.

Tamen, (se nur ne estis tiu ĉiama 'tamen' ...) eĉ se ni facile (?) trovos la monon por la eldono de tiu ĉi unua verko, ĉu ne estus bedaŭrinde ne daŭrigi eldoni ankaŭ aliajn produktaĵojn ?

Laŭ mi, jes ni povus daŭrigi la eldonadon, se ni nur volus.

Kiel ?

Jen :



0 1 JULI 1981

P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 13-a de junio en Antverpeno.

Ĉeestas : Roger De Schepper, Guido Schroeyers, Marie-Thérèse Henquinez, Fernand Roose, Paul Peeraerts, Jan Bovendeerd.

Petis senkulpigon : Edward Symoens, Jules Verstraeten, Kristin Tytgat.

Prezidas : Roger De Schepper

Protokolas : Jan Bovendeerd.

Komenciĝo : 10.15 h.

T A G O R D O

1. La protokolo pri la estrar-kunsido de 09 05 1981 estas aprobita.

2. Raportado de la estraranoj :

2.1. Administrado.

JB 2.1.1. La raportado pere de "INFORMILO" ŝajne plaĉas al ĉiu.

2.1.2. Unu rimarko : la protokolo ne devus troviĝi unualoke en la bulteno, ĉar la leganto povus esti fortimigita pro la seka, protokola lingvaĵo.

2.1.3. JB proponas do aranĝi la bultenon tiel, ke la protokoloj aperu sur apartaj paĝoj meze en la revueto, io kio permesas ankaŭ, ke tiuj kiuj volas aparte klasigi la protokolojn, povos elpreni ĝin sen ke pro tio la bulteno perdu sian enhavon. La paĝnombrado tial estos en romanaj ciferoj.

2.1.4. Aprobite.

2.2. Edukado.

2.2.1. Kadrokursoj.

2.2.1.1. La unua kursotago ( kiun la protokolanto ne povis partopreni ) laŭ la partoprenintoj estis tre interesa, kvankam por ne instruistoj eble tro faka.

2.2.1.2. Proponiĝas organizi, ĉe la fino de la kursoserio, diskuttagon por kolekti la kritikojn, rimarkojn, sugestojn ktp kaj raporti en la U.K. 1982.

2.2.2. Broŝuro "ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO"

2.2.2.1. La dua malneto = la unua korektita estas dissendita. Kelkaj rimarkoj jam alvenis.

JB 2.2.2.2. Post nova korekto kaj aprobo de la definitiva teksto, JB entreprenos la tradukon en la nederlandan, kunlabore kun Esperanto-Centro Nederlando.

2.2.2.3. Normale la broŝuro ankaŭ devus esti tradukita en la francan, por

ebligi taŭgan propagandon por la UK 1982. Ĉu eble S-ro M. Demonty povus fari la tradukon ? JB informiĝos.

2.2.3. ESPERANTO POR TURISTOJ

2.2.3.1. Envenis de S-ino Szabo Felsö turisma gvidilo Hungara-Esperanta kun la peto traduki ĝin en la nederlandan kaj francan.

RDS R. De Schepper, sekretario de la LKK/UK 82, priekzamenos, kadre de la LKK, la taŭgecon por la UK

2.3. FINANCOJ

2.3.1. Ĝenerale : pro malĉeesto de J. Verstraeten, raportas P. Peeraerts.

2.3.1.1.1. Finfine, ni nun disponas pri la ciferoj de 1980. Ĉefa konstato : estas pli da ŝuldoj al FEL ol de FEL.

2.3.1.1.2. El la bilanco montriĝas, ke nia financa situacio restis la sama = nek progreso, nek malprogreso.

2.3.1.1.3. La prognozo estas ia malaltiĝo sekvota de plialtiĝo.

2.3.1.2. Spezokontoj : Nia decido alkalkuli renton pro malfrua pago havis tiun efikon, ke intertempe multaj ŝuldintoj pagis sian ŝuldon.

2.3.2. Librotenado

PP 2.3.2.1. Laŭleĝe por ĉiuj transakcioj kiuj ne koncernas bankon aŭ poŝtĉek-konton, ni devas mem krei dokumentojn subskribotaj de la kasisto kaj la prezidanto.

ES 2.3.2.2. Ĉar tio kreas certajn malfacilaĵojn pro la distanco inter la loĝlokoj de la prezidanto kaj kasisto, S-ro Maertens proponis, ke la prezidanto delegu sian prokuron al P.Peeraerts.
Aprobite.

PP 2.3.2.3. PP proponas malfermi ŝparkonton nome de FEL por eviti ke sufiĉe grandaj sumoj restu en la kuranta konto kaj ne alportas interezon.
Aprobite

2.3.2.4.1. PP ankaŭ proponas alpreni "BANCONTACT"-karton. Tio ebligus unuflanke tempo-(do, salajro)-gajnon, ĉar oni ne plu devas speciale iri al la banko kaj vicostari por deponi monon en la konton.

2.3.2.4.2. Tio plie ebligas havi klaran superrigardon sur nia kas-situacio.

2.3.2.4.3. Ĉu malavantaĝo ? Eble, ĉar per ĉekoj la financaj negocoj postulas du subskribojn. Tamen, ĉar ĝenerale la ĉekoj estas antaŭsubskribitaj ĉu de la sekretario, ĉu de la estrarano pri financoj, tiu rezervo estas nur teoria.

2.3.2.4.5. Propono aprobita.

2.3.3. Planado : nenio menciinda. La afero estas enkoraŭ en stadio de pristudo.

2.3.3.1.1. Fiksdataj mondeponoj.



2.3.3.1.1. Ankoraŭ nenio envenis.

PP 2.3.3.1.2. Klarigo aperos en la julia numero de ESPERANTO PANORAMA. Eble post tiam ekenvenos ŝparsumoj.

2.3.3.2. Subvencio HODLER.

2.3.3.2.1. Okaze de la inaŭguro de la ESPERANTO-DOMO, D-ro Sadler anoncis al JB, ke FEL ricevos subvencion. Pri la sumo li tamen ne estis certa.

PP 2.3.3.2.2. PP, kiu renkontos D-ron Sadler en la proksimaj tagoj, informiĝos pri la sumo kaj la pagdato.

2.4. INFORMADO - PLANADO -AGADO

ES 2.4.1. La prezidanto per letere antaŭmetis demandaron/enketilon por inventari la disponeblajn kaj laboremajn homfortojn por la E-o movado en Flandrio.

2.4.1.2. RDS proponas ke, antaŭ ĉio, ni demandu la opinion de Anne Tilmont kaj ke ni pridiskutu la aferon en la estrarkunsido de septembro.

PP 2.4.1.3. PP priparolos la aferon kun Anne Tilmont.

2.4.2. Reprezentantaro/

2.3.2.1. JB sin demandas ĉu la personoj, kiuj sin anoncis kiel reprezentantoj en vere estas membroj; ĉu ili (re)pagis sian kotizon ? Se ne, ni ne povas akcepti ilin kaj ne povos daŭrigi la alsendon de protokoloj kaj alia informmaterialo.

PP 2.4.2.2. Antaŭ ol (draste) interveni en tio, PP havigos al JB la liston de la ne (re)pagintoj.

JB 2.4.2.3. JB tiam sendos memorleteron kaj nur post kiam evidentiĝas ke ili ne reagis, ni forstreku ilin el nia organigramo.

2.5. KONTAKTOJ KUN LA GRUPOJ

GS 2.5.1. Limburgo

2.5.1.1. ESPERANTO HASSELT esploras la eblecon publikigi Esperanto-kurson en Limburga gazeto.

GS 2.5.1.2. Ekde septembro ESPERANTO LIMBURG organizos regulajn diskutkunvenojn en la Kultura Centro de Hasselt.

2.5.1.3. VTB-Diest rezignis pri la antaŭe planita E-o kurso.

2.5.2. Brabanto

2.5.2.1. En Brabanto provinca agado ankoraŭ ne startis, sed ni ne forgesu ke la sola aktiva grupo (ESPERANTO 2000) prizorgos la IJK en 1982.

2.5.2.2. La sekretario de ESPERANTO 2000 (Marc Van den Bempt) komunikis sian telefonnumeron : 016/20 14 53.
Ĉiu bonvolu kompletigi la organigramon.

2.5.3. Okcident Flandrujo

2.5.3.1. FR intertraktas kun LA KONKORDO el Kortrijk, kiu nun estas en malfacilaj cirkonstancoj, por restarigi E-o kurson en aŭtuno.

2.5.3.2. En OOstende evidentiĝas ek-aktivado.

FR 2.5.3.3. FR intencas kunvenigi la izolajnmembrojn de Okc. Flandrujo en septembro.

2.5.3.4. Pri Diksmuide ne estas espero.

2.6. KULTURO

2.6.1. Al la dissendita cirkulero (= artikoleto en INFORMILO de majo 1981) "Kulturpolitiko de Flandra Esperanto-Ligo" neniu respondis, malgraŭ promeso el Gent.

FR 2.6.2. FR kolektos informojn kaj, fine de la jaro, faros kompletan raporton.

3. ESTONTA AGADO : Kiel alfronti la regantaj sociaj fenomenoj.

JB 3.1.1. Sekve al interparolo kun la prezidanto, JB klopodis fari analizon de la situacio en artikolo por INFORMILO : "Ĉu havas sencon tio, kion ni faras".

3.1.2. Anstataŭ publikigi ĝin antaŭ la ferioperiodo, kun risko de forgeso, proponiĝas dissendi la malneton al la ceteraj estraranoj por korekto/kompletigo, (mal)-aprobo ktp kaj eventuale publikigi ĝin en la septembra numero de INFORMILO.

Aprobite. (La estraranoj jam trovos la tekston ĉi kune)

3.2.1. JB opinias, ke ni ankoraŭ ne sufiĉe bone kunlaboras kun la junularo, kun FLEJA, do.

JB Proponiĝas organizi kunvenon de FEL-estraro kun FLEJA-estraro je sabato 22 08 1981.

3.2.2. Pri la kunsido FLEJA, buŝe de F-ino Gerd JACQUES,kiu partoprenis parton de la kunsido, konsentas. Pri la dato ŝi ankoraŭ konfirmos.

FLEJA 3.2.3. Okaze de tiu kunsido, RDS proponas pritrakti la projekton de la buĝeto 1982. FLEJA do bonvolu prepari ĝin.

4. ĜENERALA SITUACIO (vidu la protokolon de 11 04 81, 2.1.3.)

4.1. Apogkartoj :

4.1.1. JB sin demandas (denove) ĉu tamen ne krei apogkartojn (steunkaarten) anstataŭ la amikarajn kartojn, por tiel havi pli da enspezoj.

4.1.2. Se la ideo en si mem ne estas malbona, la rezulto de io tia en la nuna situacio estas tro necerta.

4.1.3.1. "Revenas sur la tapiŝon" la administrado de F.E.L.

4.1.3.2.1. JB opinias, ke kompleta reorganizado de la landa asocio (FEL,do) evitus i.a. perdo de membroj, certigo de niaj enspezoj el la kotizoj.



4.1.3.2.2. Ĝis nun FEL komplete dependas de la (bonvolo de la) grupaj kasistoj. Membroj ĝenerale repagas sian kotizon nur kiam oni petas tion. Se la kasisto forgesas tion fari aŭ ne memorigas la aferon, la mebroj perdiĝas.

4.1.3.2.3. Centralizita administrado permesus kontrolon kaj regulan memorigon, certe nun, ke ni disponas pri komputoro.

JB 4.1.3.2.4. Antaŭ ol ion entrepreni en tiu rilato, JB informiĝos pri la strukturo de aliaj organizoj, kiuj tiel administras siajn aferojn.

5. ESPERANTO-DOMO - Rilatoj kun Institucio Hodler, UEA kaj LA VERDA STELO

5.1. RDS faris serion da demandoj al la prezidanto de Institucio Hodler, S-ro Woessink, rilate al la luado ktp de la domo. Ni memoru, ke la domon aĉetis la Institucio.

5.2. S-ro Woessink respondis sufiĉe detale kaj faris proponojn.

5.3. Tamen tiu ĉi punkto estanta tro detala kaj ĉar la estraro fakte ne devas koni ĉiujn detalojn kiujn bezonas la financa komisiono, tiu ĉi pristudos la aferon kadre de la projekto de kontrakto, kiun nun preparas S-ro Maertens kaj poste konsilos al la estraro.

6. Vojaĝ- kaj aliaj kostoj rilate al la kadrokursoj : ĉu repageblaj ?

6.1. La kostoj de la kursgvidantoj kompreneble estu komplete repagitaj. Tio estas tute normala afero !

6.2. Rilate la kurspartoprenantojn, la afero estas iomete diferenca, konsiderante i.a. ankaŭ nian propran financan situacion.

6.2.1. proponiĝas la jenon :

- ĝis 25 km. for de la centro, ne repago
- ekde pli ol 25 km for de la centro : repago de la transportkostoj je trajntarifo 2-a klasa.

6.2.2. El tio sekvas ke ĉiu prenu por sia konto parton de maksimume 25 km. de la transportkostoj.

6.3. La repagoj okazos tuj kiam envenos la subvencio promesita de Institucio Hodler.

6.4. Pri tiu pago ni antendas la respondon de D-ro Sadler (vidu 2.3.3.2.2.)

7. Ĉu kunveni ankaŭ en la monato julio ?

7.1. Ne, nek en aŭgusto, krom kompreneble la kunveno kun FLEJA.

8. DIVERSAĴOJ

8.1. Laborkalendaro 1981/1982

8.1.1. proponiĝas daŭrigi kiel antaŭe, nome kunsidi ĉiun 2-an sabaton de la monato, krom en la ferioperiodo.

8.2. Buĝeto 1982.

ĉiuj 8.2.1. Ĉiu estrarano estas petata ensendi sian programon por 1982 kune kun evaluado de siaj tiurilataj kostoj por la septembra kunsido.

8.3. Subvencio FEL/UEA

8.3.1. Laŭ PP la divido de la subvencioj, kiujn ni ricevas de la ŝtato ne plu respondas al la realeco. Ĝi estu reprikonsiderata.

8.3.2. Tiu ĉi punkto estu prokrastita ĝis post la ricevo de la konfirmo de la ŝtataj instancoj kaj kadre de la nova kontrakto, kiun nun preparas S-ro Maertens.

8.3.3. Ni nepre atentu, ke en la nova kontrakto antaŭvidiĝu klaŭzon rilate al la fakturado al FEL de la laboro farita de Grafika Centro Antverpeno favore al FEL.

Fino 15.45 h.

JB



Se ni trovus personojn, kiuj pretus individue (kompreneble kiel eble plej multope) doni al sia financentrepreno (banko, ŝparkaso ktp.) permanantan pagordonon de ekzemple BF 100,- pagota ĉiumonate en iun specialan konton, ni kreus al ni tre facile kaj sen tro de ŝarĝoj la necesan kapitalon por eldoni almenaŭ unu verkon jare !

Ĝis nun konsentis pri tio jam 2 kandidatoj, eĉ antaŭ ol la ideo estas lanĉita ! 50-o da interesitoj sufiĉus, ĉar tiel ni sukcesus kunigi BF 60.000 jare ! Ĉu vi konsciiĝas pri tio ? BF 60.000 per nur BF 100 monate ? Kaj tamen !

La speciala konto - kiu devas ankoraŭ esti malfermita kompreneble - povus ricevi la nomon de fondaĵo, ekzemple "FONDAĴO R. DE ROOVER", honore al la unua verkisto de Flandra Esperanto-Ligo.

Kompreneble ankaŭ estus ke ni starigu komisionon, ne nur por la administrado de la fondaĵo, sed ankaŭ por prijuĝi la verkojn prezentotajn antaŭ ol eldoni ilin. Mi ne povas al mi imagi, ke ni ne trovus por tio la taŭgajn personojn.

Jen la baza ideo pri io, kio laŭ mi estas facile efektivigebla kaj kiu povus al ni doni ian direkton por financi eventualajn aliajn projektojn.

Aliflanke, mi aŭdas jam la rimarkon, ke ni ĉiam nurpetas monon. Tamen, ne miskomprenu min. Tiu ĉi sistemo ne nur celas esperantistajn poŝojn, sed ankaŭ tiun de ekstermovadanoj kiuj pretas iasence helpi.

Certe, antaŭ ol io ajn entrepreni tiurilate, ni volas aŭdi kiom eble plej da aliaj voĉoj, ankaŭ vian !

Havigu al ni vian opinion; sendu al ni viajn rimarkojn, sugestojn aŭ riproĉojn. Nur ne restu silenta !

Kiu reagos unua ?

(Ne ĉiuj samtempe, mi petas ! )

JB

PREPARE AL LA UNIVERSALA KONGRESO DE 1982 EN ANTVERPENO

Ĉu la venonta universala kongreso en Antverpeno povos favore efiki sur la publiko ?

Ĉu ni mem, eĉ ne estante LKK-ano, povas efike kunlabori kaj helpi al ĝia sukceso ?

Jes, laŭ mi, certe !

Eblecoj ja estas, eĉ se ne abunde. Jen kelkaj.

Jam ekde nun ni povus, tiel loke, kiel regione, kiel lande regule kaj ripete atentigi la publikon, pere de la gazetaro kaj aliaj informmedoj pri la alproksimiĝanta kongreso, pri la internacia "hom-amaso" kiu svarmos super Antverpeno, pri la fakto ke lingvaj malfacilaĵoj tie ne ekzistas, pri . . . . ĉu mi daŭrigu ?

Samokaze ni povus anonci - kaj poste ankaŭ realigi ! - kursojn speciale por tiuj, kiuj volas sperti tion, pri kio ni fanfaronas.

Ni tamen zorgu, ke tiu kursoj estu provizitaj per "ĉapitro" "KION MI POVAS FARI PER ESPERANTO ?"

Tiucela broŝuro cetere nun pretiĝas kaj estos havebla antaŭ-longe.

Tamen, pri tiuj kursoj mi havas kelkajn dubojn, almenaŭ pri la lernolibroj. Ĉu tiuj, kiujn ni uzas, estas ankoraŭ nuntempaj, sufiĉe modernaj ? Ĉu ne stulte ankoraŭ uzi kursolibrojn de antaŭ 50 jaroj aŭ eĉ pli ? eĉ se ilia prezo estas malalta ?

Eĉ se, pri la kursolibro decidu la kursgvidanto, tamen ŝajnas al mi ke la kursgvidantoj akordiĝu inter si pri la libroj el kiuj ili elektu la de ili uzotan.

Niaj kadrokursoj povus efike helpi !, kvankam fakte pri tio devus respondeci ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), sed je tiu flanko ŝajne regas silento.

Mi ĉefa zorgo tamen rilatas kun KORESPONDAJ KURSOJ. En unu el la lastaj estraraj kunvenoj okazis jam mallonga diskuto pri tio (fakte dum la paŭzo, "inter poto kaj pajnto").



Grave, eĉ necese ŝajnas al mi, organizi oficialan korespondan kurson de FEL - eventuale en kunlaboro kun niaj nederlandaj kolegoj.

Esperanto Centrum Nederland disponas pri taŭgaj korespondaj kursoj, du serioj de 20 lecionoj.

FEL povus kontaktiĝi kun ECN por negoci la kondiĉojn pri - jes aŭ ne - komuna aranĝo.

Tamen, tutunue ni devos disponi pri personoj kiuj pretos kunlabori en la korekta laboro kaj dissendo de la taskoj.

Due, tiu korekta laboro devas ne esti senpaga !

La periodo, kiam ĉiu por-Esperanta afero devis okazi senpage ol pagite eĉ el la poŝo de la iniciatanto, estas jam delonge for ! Nun regas ja : "Nenio por nenio !", ĉu ne ?

Nia movado, kiel cetere ĉiuj asocioj kiuj volas sukcesi, devas sin organizi (kaj certaj jam sin organizas) kiel komercaj entreprenoj, eĉ se ne kun nura kaj same granda profito. Komparu la politikan vivon, ankaŭ tie regas tn. idealismo ! . .

Resume, la oficiala (mi emfazas oficiala) koresponda kurso, pri kiu respondecu FEL, kostu seriozan prezon. Ni ne timu ! Estas personoj, multaj eĉ, kiuj pretas elspezi milojn da frankoj por lerni fremdan lingvon, kompreneble kun la celo iam ion gajni el tio, sed sen iel esti certa pri tio. Ni do nepre kaj tre klare ekspliku al niaj kursanoj ĉiujn eblecojn de la Internacia Lingvo, tiel ke ĝia lernado valoru ne nur la penon, sed certe ankaŭ la prezon.

Krom tio gravas la buŝa reklamo. Ni ne timu paroli pri Esperanto. Multaj homoj sin interesas pri la afero ! Nur pedantuloj, nur iaspecaj trinkej-profetoj havas antaŭjuĝojn. Ili cetere ĉiam kaj kontraŭ ĉio havas antaŭjuĝojn. Ili havas nur tion !

Ni tamen zorgu ke ni estu bone informitaj, ke ni ne mem agu pedante ! Ni mem ne kontraŭdiru nin mem aŭ unu la alian. Nenio tiel malbone efikas ol eraroj aŭ kontraŭdiroj ! Tion ni ne forgesu !

Ankaŭ tie niaj kadrokursoj estas taŭga rimedo !

# B E L G A   E S P E R A N T O - F E D E R A C I O

01 JULI 1981

## D U A   F E D E R A C I A   K O N G R E S O

Datoj : 3-a kaj 4-a de oktobro 1981

Loko : 1060 BRUSELO, Fortstrato 35 A

Provizora programo

- Sabato 3-a de oktobro : 10.00 h. interkonatiĝo
  samtempe : BEF-estrarkunsido
  Lingva ekzameno, rapidkurso
  - 12.00 h. tagmanĝo (300 F.) kaj/aŭ trinkaĵoj surloke
  - 13.00 h. omaĝa ceremonio en av. Zamenhof en Anderlecht
  - 16.00 h. sandviĉoj kaj trinkaĵoj en la kongresejo
  - 17.00 h. ĝenerala kunsido de APE
    administrantara kunsido de FEL
    kunsido de BEFA
    Kunsido de ILEI
    samtempe : prezentado de filmoj/videokasedoj
  - 19.00 h. muzik- kaj filmvespero - dancebleco
- D-manĉo 4-a de oktobro : 09.30 h. ĝenerala jarkunsido de BEF
  - 12.00 h. manĝebleco en la ĉirkaŭaĵo
  - 13.30 h. ekskurso : gvidata vizito de la historia centro de Bruselo aŭ de muzeo

---

## A L I Ĝ I L O

resendota antaŭ 15 09 1981 al Marc DEMONTY, Av. des Missionnaires 39 b.5
Missionarissenlaan
1080 BRUSELO

Nomo _______________________________________

Profesio (nur por statistikaj celoj, do ne devige) _____________

Adreso ______________________________________

Intencas partopreni : la tagmanĝon je la 3-a de oktobro jes/ne °
la vespermangon je 4-a de oktobro jes/ne °
la ekskurson al Anderlecht - sabate jes/ne °
la lingvan ekzamenon jes/ne °
la ekskurson de dimanĉo jes/ne °

Deziras tranokti : ĉe esperantistoj jes/ne °
en hotelo jes/ne °

° indiku la deziraton.

Dato kaj subskribo.

Resumu ni konklude aŭ konkludu ni resume :

- ekde nun : inform-propagando pere de la gazetaro/amasmedioj

- ekde la nova lernojaro : pliigita kursorganiz-aktiveco

- samtempa kaj daŭra organizo de OFICIALAJ korespondaj kursoj

- mem-informado pere de la kadrokursoj

- informado de la publiko.

--------

Al tiuj ĉi konsideroj ni denove antendas viajn reagojn !

Nur kompatu la leterportiston !

Dankon

JB.